# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO / JAARGANG 6 N° 3 MART. 1986

ATENTINDAĴOJ

VENONTA ESTRARKUNSIDO DE FEL : SABATON 1986 04 19 EKDE 10.00 H.

TRI-LANDA RENKONTIĜO EN MAASTRICHT JE DIMANĈO 4-A DE MAJO 1986
INFO : F-INO MIA MARTENS
KAROLINGENSTRAAT 5 B
NL-6224 HM MAASTRICHT, NEDERLANDO

P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 15-a de marto 1986 en Antverpeno

Ĉeestis : Erik D'Hondt (ED), Paul Peeraerts (PP), Edward Symoens (ES), Hilde Vaningelgem-Vandriessche (HVI) kaj Jan Bovendeerd (JB).

Petis senkulpigon : Ivo Durwael kaj Jules Verstraeten.

Prezidis anstataŭ ID : JB

Protokolois : JB

Komenca horo : 10.00 h.

---

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 08 02 1986 estas aprobita.

2. Nia propono al la Nederlandaj esperantistoj organizi alternivajn kongresojn, ricevis negativan respondon.(vidu p. 6 de la antaŭa protokolo.)

3. PATRONA KOMITATO por la jubilea jaro.

Antaŭ kelkaj jaroj ni decidis atendi la registarajn re-elektojn por klopodi kunmeti patronan komitaton. La tempo do nun venis.
ES okupiĝos pri la afero.
Tamen, kiun demandi ?
Komenci per la Reĝo kiel alta protektanto ? Kaj poste ?
ES telefonos kun S-ro G. Maertens por interkonsenti pri tio.

4. FINANCOJ

4.1. La ĝenerala situacio estas sana.

4.2. Libro-rondo STAFETO

Al nia cirkulero pri realiĝo al la libro-rondo respondis ĝis nun 20-o da personoj.
La princ ipo estas jena : ĉiu el la rondanoj antaŭpagas - aŭ deponas - po BF 1.000,- kaj ricevas ĉiujn eldonotajn librojn.
Kiam la deponita sumo elĉerpiĝas, ili repagas.
Laŭ tiu sistemo la eldonoj povas esti grandparte financataj.

4.3. Subvencioj :

4.3.1. La sistemo ne ŝanĝiĝis. La sumo de la antaŭa jaro + 5 % .
Tio ĉi por la ŝtataj subvencioj.

4.3.2. La provincaj subvencioj (provinco Antverpeno) tamen ne ŝanĝiĝas. Plie eĉ, la Provinca Kultur-konsilaro, sekve al decido de la Deputitaro, konservos FEL en la sama kategorio en kiu ĝi ĝis nun estis. Do, al nia peto eniri alian - por ni pli



interesan - kategorion ne akceptiĝis.

5. Kongreso en Blankenberge : la aliĝiloj estas pretaj kaj disdonotaj en la posttagmeza ĝenerala kunsido.

6. KLUBO 100

PP zorgos pri la fina membrolisto.

7. Diversaĵoj :

La estraro aprobas meti anoncon en la "Uitgave Secundair Onderwijs voor Sociale Promotie e.a. Deeltijdse Opleidingen" (PRIPOVA).

8. Preparo de la posttagmeza ĝenerala kunsido.:

Ĉiu opinias kaj JB anstataŭu ID, kiu ne povos ĉeesti pro malsano de la edzino.

Ni sekvu la saman skemon kiel pasintjare, do :

- raportado de la grupoj pri la plej suksecaj kaj malsukcesaj okazintaĵoj.
- raportado de estraranoj kaj laborgrupoj
- honorigo de LA KONKORDO
- kondolencesprimo pri F. Couwenbergs
- kunmeto de la administrantaro
- estrarelekto
- prezidantelekto
- instalado de la nova estraro
- debato pri estontaj agadoj.

Fino de la kunsido : 11.30 h.

---

## PROTOKOLO

pri la ĝenerala jarkunsido de sabato 15-a de marto 1986 en Antverpeno

---

Reprezentataj grupoj : Aalst, Antwerpen, Brugge, Gent, Hasselt, Kalmthout, Knokke (antaŭe Blankenberge) Kortrijk, Leuven, Mortsel, Wilrijk.

Ne reprezentataj : Brussel, Mechelen kaj St. Niklaas

Senkulpigon petis : Ivo Durwael kaj Jules Verstraeten.
Komenca horo : 14.00 h.

Prezidas kaj protokolas : JB.

I. Grupa raportado :

Nenio speciala. La raportantoj referencas al la ensenditaj de sia sekretario raportoj.

Kortrijk, kiu ne ensendis raporton, anoncas - verŝajne pro la festado ĉirkaŭ la jubileo de LA KONKORDO (60-jara) - kursorondon ± 40 membran.

A. Marmenout proponas ŝanĝi la nomon de Esperanto Blankenberge en Esperanto KNOKKE.

## LA VERDA STELO

Laŭ la celoj de La Verda Stelo, ni dividu la aktivecojn en 3 kategorioj Propagando, Kursoj, Praktikado de Esperanto.

1. Propagando:
   - Gazetara servo vakas
   - 1 publika vespero de Jo Haazen, kun ĉeesto de 100 homoj
   - produkto kaj distribuo de 7 diversaj afiŝoj por la vespero de Jo Haazen kaj por diversaj kursoj
   - eldono de speciala informn-ro de Esperanto Panorama + aldon de aldona folio en marto 85.
   - dissendado de E° Panorama senpage al ĉiuj interesitoj
   - informa ekspoziceto dum la vespero de Jo Haazen + 15 taga ekspozicio en GB-Groenplaats.
2. Instruado:
   - La urbaj kursoj en Quellinstr havis kontentigan nombron da gelernantoj (la jaro: 18 enskribitoj).
   - LVS organizis 2 vaporkursojn; 1 ne okazis pro manko de kandidatoj la 2-an ĉeestis 8 personoj.
   - Stefan MacGill gvidis 1 konversacian kurson kun 4 partoprenantoj.
   - Dirk De Weerdt ekgvidis 12 semajnan kurson. 12 personoj enskribiĝis.
   - La kursoj en Mortsel okazis dum la tuta jaro.
3. Praktikado:

a) En nia klubejo okazis la tradiciaj ĉiusemajnaj programoj, i.a.

- 12 prelegoj
- 22 " kun diapozitivoj
- 3 " " debato



- 2 " " demonstracio
- 2 " " citado el propra verkaro
- 2 skeĉovesperoj de Jan Bovendaerd
- 1 varian vesperon de la britaj geknaboj
- 1 partopreno al surstrata kantkoncerto
- 2 forumaj debatvesperoj
- 2 distraj vesperoj
- 1 jarkunsidon

b) Niaj gemembroj, kiel kutime, aktivis en plej diversaj esperantistaj renkontiĝoj:

- enlandaj: i.a. SIA en Leuven, trilandaj renkontiĝoj en la oriento (sed apenaŭ ĉeesto en Brugge), Merckenveld, promenralio en Gent, Zamenhoffesto en Gent, proks. ĉiuj programoj en Kalmthout kaj Mortsel.
- eksterlandaj: plej popularaj restis U.K. kaj Grésillon. La gejunuloj plej aktivis en multaj internaciaj renkontiĝoj: I.J.K., I.S., NEJ-renkontiĝo, GEA-kongreso, rekontiĝoj en Pollando, Jugoslavio, Strasburgo ktp.

c) Nepre mencindas la gastigon de eksterlandaj vizitantoj al Antwerpen. En la kluba programo partoprenis 15 eksterlandanoj, inter kiuj 3 loĝas en Belgio. Sed la nombro da vizitantoj de nia klubejo sumiĝas je dekoj.

### RAPORTO PRI LA AGADO DE "LA PIONIRO" EN LA JARO 1985-A

Tiu ĉi raporto estas farita, provizore, el mia propra nomo, ĉar mi ne havis la okazon aprobigi ĝin de la nova estraro.

La grupo havis 47 membrojn en 1985. Novaj membroj anstataŭis la forfalintajn, kaj la nombro do nur iom kreskis.

Kunvenoj okazis ĉiumonate, kaj meznombre ĉeestis 15 membroj. Estis 2 gastprelegantoj (anoncita Kolombiano ne alvenis), unu prelego de membro kiuj ĵus finis la kurson, kuirkunveno, barbekjuo kaj kelkaj kantkunvenoj.

Fine de 1984 ok membroj ĉeestis la Zamenhoffeston en Gento kaj fine de 1985 ni estis tie dudekope.

Plie okazis: ekspozicio dektaga, en la libertempokupa foiro en Alsto, prelego por VTB, du duontagaj promenoj kaj unu tuttaga en la Ardenoj (ĉe estrarano).

Eksperimenta sanĝiĝo de kunvenejo malsukcesis.

De la klubrevuo aperis dek normalaj plus 3 specialaj, varbaj, nederlandlingvaj numeroj, kun entute 84 paĝoj. Ofte ĝi alvenis nur la tagon antaŭ la kunveno sed tamen neniam poste !

Estis tri kursoj. Unu, kiu komenciĝis en majo, kun 5 lernantoj bonege sukcesis ĝis la interrompo de la ferioj... sed poste ni ne (pli ĝuste : ne jam) sukcesis daŭrigi ĝin. Tamen, ĝis la ferioj ĉiuj lernantoj daŭre restis. Alia, de septembro al decembro, havis 7 lernantojn je komenciĝo kaj finis kun 8 lernantoj. Sekvis ĝin konversacia rondo.

Neniu membro ĉeestis la Markolan kongreson, ĉar (?) la foiro estis samtempa, sed kelkaj partoprenis en la Semajno de Internacia Amikeco en Loveno. Ankaŭ en aliaj lokoj ni ofte estis reprezentitaj, sed, kompreneble, ĉiam per pli malpli la samaj membroj.

Ni eldonis, kiel servon precipe al niaj lernantoj, vortareton por "La Komencanto", kiu jam elĉerpiĝis !

La novaj lernintoj ĉiuj aliĝis al la grupo kaj regule ĉeestas la kunvenojn.

Onidire... la grupo multe vigliĝis, reentuziasmiĝis pro la foriro de la prezidanto, kaj laŭ la plej lasta Pioniro, ili finfine nun estas sur la ĝusta vojo !

Petro De Smedt

# ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

Rega Societo
Fondita la 10/2/1907 — P.Ĉ.K.: 000-0123048-52
Aliĝinta al BELGA ESPERANTO-FEDERACIO
(Membro de U.E.A., en konsultaj rilatoj kun Unesco)

31.01.1986

Jen la lastaj novaĵoj pri nia grupo:

Kunvenejo

Nia kunvenejo estas depost la komenciĝo de 1986 la jena:
Europa-club, Kortenberg-avenuo, 66, Bruselo

Bonvolu noti ke neniu korespondaĵo estas sendota al tiu adreso, sed kiel kutime al iu estrarano.
La translokiĝo de niaj aktivecoj en klubdomon de la Eŭropaj funkciuloj faciligos niajn rilatojn kun ili.

Kursoj

Efektive, komenciĝis en januaro 6-kapa kurso en kiu 4 tiaj funkciuloj partoprenas.
Entute funkcias nun ĉe ni 4 instrugrupoj je diversa nivelo, atingante plimalpli 20 gekursanojn.
En la Vrije Universiteit Brussel, malgraŭ prepara afiŝkampanjo kaj anoncaĵo en diversaj Bruselaj informiloj, nur 3 personoj sekvas la nove kreitan kurson. Kontaktoj kun la studentoj malfacilas pro la ne-ekzisto de studenta gazeto.

Estraro

Nia estraro estas nun jena:
prezidanto: Van Damme Emile, Albert I straat 44, 1750 Schepdaal,
tel.: 02/569 17 83
vicprezidanto: De Bruyne Leo, Schotlandstraat 73, 1060 Bruselo
tel.: 02/538 71 66
Kasisto: Brabant Roger, avenue Hansen-Soulié 75 B6, 1040 Bruselo
tel.: 02/735 13 38
Sekretario: De Bloudts Jacques, rue Washington 173, 1050 Bruselo,
tel.: 02/345 15 89
Helpsekretario: Régis Larue, av. Parmentier 74, 1150 Bruselo,
tel.: 02/770 86 80

Administrantoj

Konsentis roli kiel administrantoj:
s-ro Staels, Jef, Zenithstraat 18, 1080 Bruselo, tel.:
tel.: 02/465 03 35
kaj eventuale
s-ino Falk Hélène, av. des Chênes 7, 1640 St Genesius Rode,
tel.: 02/358 42 14

Pro manko da tempo mi ne povos partopreni en la venonta ĝenerala jarkunsido kaj petas vin senkulpigi min antaŭ la ĉeestantoj.

Kun sinceraj salutoj,

VAN DAMME Emile
Albert I straat 44
B-1750 SCHEPDAAL



RAPORTO "LA PROGRESO" 1985

januaro

14.01 : laborkunveno
15.01 : konversacia vespero
25.01 : ĝenerala jarkunveno kun akcepto kaj elekto de la nova estraro. Ni bonvenigis Nancy Haegebaert kiel la respondantinon pri turismo.

februaro

11.02 : laborkunveno
22.02 : René Budts prelegis kaj montris diapozitivojn pri la kvartalo "Patershol" en Gent

marto

19.03 : konversacia vespero
22.03 : Angelos Tsirimokos el Bruselo, funkciulo ĉe la Eŭropa Komunumo, prelegis pri "Matematiko en la Antikvo"
28.03 : laborkunveno

aprilo

16.04 : konversacia vespero
22.04 : laborkunveno
26.04 : varia vespero kun kvizo gvidata de Patrick Haerick kaj prelego pri vitraj paperpremiloj fare de Monique Caestecker

majo

07.05 : fino de la kurso
18.05 : serĉpromenado en Gent kaj festsolenaĵo okaze de la fino de la kurso. Transdono de premioj al la laŭreatoj.
23.05 : laborkunveno

junio

18.06 : laborkunveno
28.06 : Nancy Haegebaert montris diapozitivojn kaj rakontis pri vojaĝo al Pollando

julio

15.07 : agrabla vespero ĉe Katja Lödor kun la ges-roj Afschrift el Ruando. Ĉeestis ankaŭ Leo De Bruyne el Bruselo kun Jorge Kamaĉo, hispana kunlaboranto en la Centra Oficejo en Bruselo

aŭgusto

21.08 : laborkunveno
29.08 : Radio Plus, loka radio en Gent, elsendis 2-horan informprogramon pri Esperanto, kun Esperanto-muziko. Patrick Haerick kaj Monique Caestecker prezentis

septembro

10.09 : komenco de la esperanto-kurso
12.09 : laborkunveno
27.09 : André Coppé el Lieĝo prelegis pri "Wat men niet weet over Esperanto"

oktobro

09.10 : laborkunveno
11-13.10 : Kultura foiro en la Handelsbeurs en Gent kie "La Progreso" havis standon
11.10 : alveno de la unua pola buso en Gent (50 poloj, inter kiuj kelkdekaj da esperantistoj)
15.10 : konversacia vespero
25.10 : raporto pri la U.K. en Aŭgsburgo kaj debato, gvidata de Patrick Haerick
27.10 : en la informprogamo "Kouten" de Radio Plus, Ludo Schelstraete kaj Patrick Haerick estis intervjuita pri Esperanto

novembro

05.11 : komenco de nova kurso, gvidata de 2 novaj geinstruistoj : Ingrid Lievens kaj Ludo Schelstraete
08.11 : dua pola buso en Gent
11.11 : laborkunveno
15.11 : tria pola buso en Gent
19.11 : konversacia vespero
22.11 : kulturkunveno kun S-ro Stefan McGill kiu prezentis skeĉojn kaj diversajn diapozitivojn
24.11 : inforprogramo pri Esperanto en Radio Anoniem. Ludo Schelstraete prezentis

decembro

05.12 : kunveno por prepari la skeĉon de la Zamenhoffesto
17.12 : konversacia vespero
22.12 : Zamenhoffesto en Gent; partoprenis 60 personoj

Nia grupo partoprenis ankaŭ en aktivecoj organizitaj de aliaj grupoj. Jen kelkaj :
17.02 : tago de la Internacia Amikeco en Leuven, 5 anoj
16.03 : F.E.L.-jarkunveno en Antverpeno, 4 anoj
30.03 : Esperantobalo de la E.E.C. en Berchem, 9 anoj
05-08.04 : Paska Esperanto Junularrenkontiĝo, organizita de N.E.J. en Loenen, Nederlando, 1 ano
05-08.04 : Brita Esperantokongreso en Llandudno (Kimrujo), 1 ano
19-21.04 : Markola Kongreso en Brugo, 3 anoj
28.04 : trilanda renkontiĝo en Soumagne (Wégimont), 2 anoj
14.06 : kabareda vespero en Antverpeno kun 12 infanoj el Suffolk (Britio) gvidata de S-ro Ron Burton, 5 anoj
25.06 : prelego pri la konstruo de liutoj en Aalst de S-ro Daniel De Keyser, 5 anoj
22.-29.07 : I.J.K. en Eringerfeld (F.R.G), 1 ano
03-10.08 : U.K. en Aŭgsburgo, 6 anoj
07-11.09 : Itala Esperantokongreso en Grado, 1 ano (nur ĝis 09.09)
11-16.09 : Internacia simpozio pri Esperanto-turismo en Pisanica (Bulgario) prepare al la Generala Asembleo de M.T.O. en Sofio, 1 ano
05.10 : F.E.L.-kunveno en Antverpeno, 3 anoj
20-27.10 : 11-a Internacia foiro de Esperanto-turismo en Bydgoszcz (Pollando), 1 ano
08-10.11 : F.L.E.J.A.-semajnfino en Merkenveld "Junuloj kaj Arto", 1 ano
30.11 : Sankta Nikolaofesto en Antverpeno, 5 anoj
13.12 : Zamenhoffesto en Bruselo, 4 anoj
27.12-04.01 : Internacia Seminario de G.E.J. pri "Akvo" en Eschwege (F.R.G.), 1 ano



ESPERANTO-KLUBO HASSELT
Sekcio de Flandra Esperanto-ligo a.s.p.c.
Sekr.: Albert CLAESEN
Zonnebloemstraat 7
B-3610 Diepenbeek
tel.: 011/33 66 03

Diepenbeek, la 22-an de januaro 1986.

S-ro Jan Bovendeerd
sekretario de FEL
Speeltuinlaan 14
2510 Mortsel

Jarraporto 1985 Esperantoklubo Hasselt:

Superrigardo de la pasinta jaro:

1. Ni kunvenis dufoje en la monato:
   -la unuafojo: "lingvostudoj", ni komune klopodas traduki nederlandajn tekstojn en Esperanton.
   -la dua kunveno: prelegoj, kantoj, lumbildoj, vortludoj, k.t.p.
2. Nur unu el la lernantoj de "test 5000" respondis nian inviton kaj ĉeestis la specialan kunvenon je la 11-a de marto 1985
3. Nur kvar lernantoj sekvis la printempan kurson, tamen 32 enskribis por la aŭtunan kurson.
4. Tri el niaj membroj finis sukcese la trian jaron de la Esperanto-kurso en la "Quellinstraat", nome: Liliane Peeters, Guido Claesen kaj Albert Claesen.
   Du el niaj membroj finis sukcesplene la duan jaron de tiu sama kurso kaj komencis la trian jaron, nome: Marcel Aerts kaj Jos Vandebergh
   Unu el niaj membroj komencis la duan jaron, nome: André Cuyvers.
5. Per la helpo de S-ro Marguillier, ni organizis informstandon en la "O.L.V. College" de Tongeren je la 16-a de majo 1985. Sekve 27 lernantoj de tiu lernejo eklernis, gvidata de S-ro Marguillier, Esperanton dum la tagmeza paŭzo.
6. Kvarope ni partoprenis la 70-an kongreson en Aŭgsburgo kie ni faris serion da lumbildoj kiujn ni jam montris en nia propra grupo kaj en la Verda Stelo.
7. Kiel ĉiu jaro, ni partoprenis la info-borson de la kultura konsilaro en Hasselt.

Planoj por la sekvonta jaro:

1. Daŭrigi la kursojn en printempo kaj aŭtuno kaj aldoni konversaciajn kursojn surbaze de la Cseh-metodo.
2. Daŭre propagandi Esperanton per iaj ajn rimedoj.
3. Partopreni inform-borsojn en Hasselt kaj Genk
4. Instigi kaj helpi S-ro Beckers en St.Truiden ke li aliĝu sian grupon al FEL.
5. Pripensi propagandan kampanjon por la provinco Limburgo.

Konciza kasraporto:

Enspezoj:

| | | |
|---|---|---|
| transpreno de la antaŭa jaro: | | 5 597 |
| membrokotizoj 1985 | | 18 316 |
| venditaj gluafiŝoj | | 4 400 |
| donacoj de membroj | | 2 000 |
| subvencio de la urbo Hasselt | | 9 167 |
| | sumo: | 39 480 |

Elspezoj:

| | | |
|---|---|---|
| E-broŝuroj de FEL | | 3 000 |
| gluafiŝoj | | 6 000 |
| membrokotizoj por FEL | | 15 257 |
| administradkostoj | | 4 100 |
| luprezo por lokaloj | | 4 200 |
| abono: "Manlibro por aktivuloj" | | 695 |
| insignoj | | 834 |
| | sumo: | 34 086 |
| | saldo: | 5 394 |

Ĝeneralaj informoj:

Ekde januaro 1986, la estraro de Esperanto Limburg eksiĝis ĉar fakte ekzistas nur unu klubo en Limburgo. Ni interkonsentis ke, kiam fondiĝos pliaj kluboj, ni tuj elektos novan Limburgan estraron. Intertempe A.Claesen transprenos la taskon de Guido Schroeyers kiel reprezentanton de FEL en Limburgo.(Se FEL konsentas!)

Se la laborgrupo por propagando aŭtomate entenas la administrantecon por A. Claesen, tiam ni proponas Marcel AERTS kiel administranton de Hasselt. Lia adreso estas: Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt, tel.: 011/25 34 67.

La estraro de Esperanto-klubo Hasselt ne ŝanĝis tiu ĉi jare.

Elkorajn salutojn,

A. CLAESEN, sekretario



LA ERIKEJO : Jar-raporto 1985

| DATO | AKTIVECO | # ĈEEST. |
|---|---|---|
| 31.1.85 | Diskutado pri "La Erikejo kaj siaj membroj" | 13 |
| 28.2.85 | Parolado "Grekujo" (A. Tsirimokos) | 16 |
| 28.3.85 | "Esperanto per komputero" ludprogramo + jarkunveno | 15 |
| 15.4.85 | Diskutado pri "Esperantaj Poemoj" (W. De Smet) | 10 |
| 23.5.85 | Parolado "Japanujo" (Jo Haazen) | 40 |
| 20.6.85 | Promenado en "De Maatjes" | 12 |
| 18.7.85 | "Barbecue" ĉe S-ro Böhme | 19 |
| 15.8.85 | Promenado tra la erikejo | 8 |
| 19.9.85 | Parolado pri la universala kongreso en Augsburg (E. Symoens) | 16 |
| 17.10.85 | Parolado "Esperanto Domo Grésillon" (I. Durwael) | 14 |
| 21.11.85 | Parolado "Mond-turismo" (L. De Bruyne) | 10 |
| 19.12.85 | Vespermanĝo | 31 |

La Erikejo, 15.01.86

kasisto

Agado ESPERANTO 2000 dum 1985 05.03.1986

Daùrigo agado 1984 :

- kurso por gekomencantoj 84/85 : finis 8 kursanoj, 13.2.85
- duajara kurso 84/85 : 7-foje kurso en '85, 6-foje Vesp.2000 9 partoprenintoj
- Vesperoj 2000 : dekfoje en la jaro, meza nombro de partoprenintoj = 11 personoj
- revuo Esperanto 2000 regule aperis 6-foje, sub la redaktado kaj administrado de FG

Agado specifa por 1985 :

- Semajno de Internacia Amikeco, inaùgura festo 17.2.85, ± 50 partoprenintoj kun FEL-kolokvo pri transakcia analizo (25 partoprenintoj)
- ĝenerala kunveno : 6.3.85, 10 ĉeestintoj
- partopreno ĝenerala kunveno FEL, 16.3.85, 2 el Leuven
- partopreno Gambrinofestoj, 16.5 - 19.5.85
- partopreno IJK Eringerfeld 22-29.7.85 : 3 gemembroj
- partopreno UK Augsburg 3-10.8.85 : 4 gemembroj
- informvespero 16.10.85 : ± 12 ne-esp.istoj, 4 esp.istoj
- semajnfina rapidkurso 19.10.85, nur sabaton : 2 ĉeestintoj
- partopreno (librostando) Eùropa Poezifestivalo 23-27.10.85
- partopreno Fleja-kongreso Merkenveld : 3 gemembroj
- prezento Esperanto en P.N.Leuven : ± 50 gelernantoj, 29.11.85
- partopreno Sta.Nikolaofesto Fleja, 30.11.86 : 5 el Leuven
- 14 estrarkunvenoj/komitatkunvenoj tra la jaro 1985
- komencis 7 skribaj kursanoj en 1985 (sistemo FEL)

Agado daùrigota en 1986 :

- vesperkurso por komencantoj Leuven, ekde la 23.10.85 ; gvidis ĝin EB, 7 gekursanoj, 9 lecionoj en 1985
- vesperkurso por komencantoj Tienen, ekde sept. 1985 ; gvidis ĝin FVdP, ± 15 gekursanoj
- daùriga kurso 85/86 : 4 kurso-, 1 informvespero, 4 vesperoj 2000 en 1985 ; 12 aliĝintoj, 9 regulaj. kun sabata rapidega kurso : 6 partoprenintoj



Agadoplano ESPERANTO 2000 por 1986 05.03.1986

Daùrigo agado 1985 :

- kurso por komencantoj 85/86 Leuven : finos 4 kursanoj, 19.2.86
- kurso por komencantoj Tienen : daùrigota ĝis majo 1986
- daùriga kurso : 6 kursovesperoj kaj 6 V2000 en 1986

Agado specifa por 1986 :

- revuo Esperanto 2000 regule aperos 6-foje, sub la redaktado kaj administrado de FG. En 1986 : 85/86- n-roj 2 ĝis 7. Post ĉi tiu jaro ĝi sekvos plene la kalendaran jaron.
- Vesperoj 2000 : 10-foje en la jaro, 2a merkredo krom jul/aug.
- partopreno Novjarfesto Aalst 3.1.86 : 3 el Leuven
- Semajno de Internacia Amikeco 15.2.86 : 60/70 partoprenantoj kun FEL-kolokvo pri novaj vojoj por Esperanto
- ĝenerala kunveno 5.3.86
- partopreno en FEL-komisiono pri informado k.s. : MV
- partopreno Gambrinofestoj 8-11.5.86
- partopreno UK Pekino : 4 gemembroj ?
- kunorganizado vesperprogramo ILEI-konferenco 12-19.7.86 en Louvain-la-Neuve
- informvespero oktobro 1986 (15.10)
- rapidkurso semajnfina 18/19.10.86
- partopreno poezifestivalo oktobro 1986
- partopreno Fleja-kongreso novembro 1986
- estrarkunvenoj kaj komitatkunvenoj : ± 15 tra la jaro
- ni mem aranĝos la skriban FEL-kurson en Eo2000

Agado daùrigota en 1987 :

- kurso por komencantoj 86/87 en Leuven : 22.10.86 ĝis feb.87
- kurso por komencantoj 86/87 en Tienen : PITO, sep.86 ĝis majo '87 ; gvidos FVdP
- daùriga kurso 86/87 : 4 V2000j, kurso : 17.9, 29.10, 19.11, 17.12.86
- ni pliaktivigos la agadon por 1987 kaj similajn grandajn projektojn ; ni provos kunmeti gvidliniojn por la agado de Eo2000 kaj ekagadi laù tiuj ; ni bezonos pli da aktivuloj.

GRUPAJ AKTIVECOJ 1985

| | Aalst | Antwerpen | Brugge | Brussel | Gent | Hasselt | Kalmthout | Leuven | Mortsel | Totaloj |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Prelegoj | 2 | 16 | | | 2 | | 3 | 8 | | 31 |
| Prel. + Diapoz. | 1 | 24 | 1 | | 3 | | | 3 | | 32 |
| Prel. + debato | | 3 | 1 | | 1 | | 3 | | | 8 |
| Gvidataj vizitoj | 3 | 1 | | | | | 2 | | | 6 |
| Filmoj | | | | | | | | | | |
| Teatrajoj | | | | | | | | 1 | | 1 |
| Muziko | 3 | | | | | | | | | |
| Kolokvoj | | | | | | | | | | |
| Ekspozicioj | 1 | | | | | | | | | |
| Infoaranĝoj | | | | | 1 | 2 | | 2 | | 5 |
| Kursoj | 1 | 7 | | 4 | 1 | 2 | | 1 | 2 | 18 |
| Amuzaj vesperoj | 5 | 5 | 3 | | 1 | | 1 | 10 | | 25 |
| Estrarkunsidoj | 3 | | | | 6 | | | 14 | | 23 |
| Klubkunvenoj (aliaj) | 1 | | 9 | | | 24 | 1 | 17 | 48 | 100 |
| Ĝeneralaj kuns. | 1 | 1 | 2 | | 1 | | | 2 | | 6 |
| Kongresoj | | | | | | | | | | |
| Festoj | 1 | | 2 | | 1 | | 2 | | | 6 |
| Internaciaj vesp. | | | | | 1 | | | | | 1 |
| S.I.A. (partopreno) | 1 | 1 | 1 | | 1 | 1 | | 1 | 1 | 7 |
| Totaloj | 23 | 58 | 19 | 4 | 19 | 29 | 12 | 59 | 51 | 274 |



II. Raportado de la estraro kaj laborgrupoj :

1. FINANCOJ (raportas PP)

Vidu ankaŭ la protokolon pri la ĉi matena estrar-kunsido.

Ĉefaj enspez-fontoj :

- fondaĵoj pri - eldonoj
  - informado
  - KLUBO 100
- membro-kotizoj
- libro-servo
- kursoj
- subvencioj.

La jaro 1985 finiĝis kun profita saldo, iom malpli granda ol 1984 sed tamen ankoraŭ vere kontentiga.

FEL, post la transpreno de la libro-rondo/eldonejo STAFETO, esperas - nu, preskaŭ certas - esti akirinta novan interesan enspez-eblecon.

2. F L E J A (raportas Ite Tytgat)

Kunvenoj : - Markola kongreso : Libroservo
- fromaĝ- kaj vinvespero (aprilo)
- partopreno al diversaj someraj aranĝoj :
  IJK, UK, Polaj kongresoj
- diapozitivoj pri somero (septembro)
- Junulara Semajnfino apud Bruĝo : 08, 09, 10 11 1985
- Sankta Nikolaa festo (30 11 1985)
- partopreno al IS

Organizaĵoj :
- Junulara semajnfino en Overpelt.
  Rilate al tiu ĉi, FLEJA kalkulas kun la kunlaboro de la loka grupo (Hasselt), ĉefe antaŭ la semajnfino, ekz. en formo de rapidkurso, vizito al vespera aranĝo k.s

Eldonoj : kasedo de TEJO kun moderna muziko.
FLEJA volas aĉeti la kasedon por vendado kun favoraj kondiĉoj por FEL.

Diversaĵoj : propagando por la Jubilea Jaro kune kun FEL
- subvencioj por gejunuloj kiuj volas partopreni la IJK 87
- oficialaj interŝanĝoj kun Pollando

Estraro : prezidanto : Wim Tytgat
sekretariino : Katrien Batsleer
Kasistino : Ite Tytgat
Kongresoj kaj eksteraj rilatoj : Ilse Jacques
JEN k. KONCIZE : Patrick Haerick
Kunlaborantoj : J.P. VandenDaele k. Anne-Marie Suykens

3. INSTRUADO, PROPAGANDO, EKSPOZICIOJ kaj KONGRESOJ

La komisiono kunvenis trifoje kaj daŭrigis la diskutadon perletere. Ĝi okupiĝis pri kvar temoj : Reklamkampanjo, Manlibro, Ekspozicioj kaj Instruontoj.

1. Reklamkampanjo :

Ni nepre konsilas uzi la servojn de profesia reklamfirmao. Inter la 8 kontaktitaj firmaoj (laŭ la raportoj de Ivo Durwael) elstaras 2, inter kiuj la estraro elektu (se ĝi decidas pri agado).
BPromotion plej faciligas al ni la taskon, sed estas dube ĉu nia buĝeto sufiĉos. La propono de tiu firmao estas malfacile reduktebla, ĉar jam minimuma. Tamen, se ni disponus pri la necesa mono, tiu propono ŝajnas plej taŭga.

La Propono Strijdonck (plej nova) ŝajnas alloga, ĉar unuavide malpli kosta, aŭ pli kontrolebla (iom-post-ioma, ne ĉiuj kostoj en unu fojo ekde la komenco). Tamen, ĝi estas pli konsila ol transprena ... do, lasas multe da iniciatemo (kaj laboro) al ni mem.

Tute egale al kiu el ambaŭ iros la prefero de la estraro, ni konsilas ke, post decido, unu aŭ du personoj daŭre okupiĝu nur pri la efektivigo de la kampanjo kaj raportado al la estraro. Sen daŭra gvidado ia ajn kampanjo estus sensenca.

2. Manlibro.

Ni proponas al la estraro ke ĝi transdonu la administradon al Marc Vanden Bempt.

Precipa zorgo estas : plialtigi la utilon kaj oftecon kaj malaltigi la prezon. Por detaloj : vidu protokolon 01 03 86

Marc petu akordiĝon de la estraro pri la pritraktotaj temoj kaj pri la definitivaj tekstoj. La ceteron li zorgu.

3. Ekspozicioj.

Unua paŝo estis farita de Ray Gerard, kiu uzis grandajn afiŝojn ĝeneraltemajn anstataŭ la ĝisnunaj troplenaj tabuloj. Kvankam la bazaj ideoj estis nepre bonaj, la fakta realigo ne kontentigis multajn.
La budo en la "Naturfoiro" nuna dece impresas kaj enhavas novajn bonajn realigojn.

Plia studado necesas ... kaj verŝajne iu kunfandiĝo de ambaŭ ideoj estus ebla.

Ni proponas : trovi taŭgan personon kiu surbaze de la nuna materialo plie ellaboru adapteblan materialon.



P R O T O K O L O

pri la kunsido de la komisiono de FEL pri informado, instruado kaj aliaj -adoj

---

sabaton 01.03.1986, Esperanto Centro Antwerpen. 10h00 - 16h00

ĉeestas : Albert Claesen (AC), Ivo Durwael (ID), Hugo Fontyn (HF, parte), Marc Vanden Bempt (MV, protokolo)
ne ĉeestas (pro neĝado) : Petro De Smedt (PDS)

1. Informado.

1.1. Enkonduko ID pri alia oferto, unua priparolado

- Post pasinta kunveno ID kontaktis 4 aliajn firmaojn pri reklamo. Unu el ili, kie li parolis kun iu sinjorino Strijdonck (verŝajne la protokolanto eraris je la skribado ...), ŝajnas plej interesa. Jen kelkaj ideoj :
- Certe necesas domstilo, kurso programita en nova vesto kaj imponа broŝuro (tiu ĉar la unua impreso gravas)
- broŝuro : en 2-3 koloroj kostas 40.000 por 5.000 ekz.oj. Eblas tamen fari allogan broŝuron iom malpli luksan kaj malpli multekostan.
  Ĝi ne estu ligata al specifa periodo : oni povas aldoni folieton kun la freŝaj informoj, aparte.
- Ni NE aĉetu pagitan reklamon en gazetoj. Gazetaraj Konferencoj estas malpli multekostaj kaj pli efikaj laŭ ŝi : eĉ eblos havi tiel reklamon en revuoj kiel Knack, en formo de artikoloj. Bona temo por gazetara konferenco povas esti la domstilo.
  Ni tamen dubas pri la pagita reklamo. Tial ni atendos la rezulton de malgrandskala reklamo de Esperanto 2000 en Passe-Partout en Leuven. Tiu kampanjeto kostos al Eo2000 4.500 fr.
- Reklamo sur kamiono, ekz. ĉe la elirejo de aŭtovojo : efika kaj malmultekosta.
- Ni mem vizitu la librovendejojn : kostos nur 30-40 %, estos pli efika ĉar ni defendos propran produkton. Ni ankaŭ uzu la nunajn rilatojn, ekz. ĉe Prisma.
- por Programita povas sufiĉi bela kartona aŭ plasta skatolo.

Ekzemplo de tio kostas + 200 fr. AC petos aliajn ofertojn, por plasta aù kartona, je 1000 ekzempleroj.
Tiu ujo entenu la kvar nunajn libretojn, la kaseton kaj eventuale iomaninformmaterialon. La libretoj jes estu same grandaj ...

- rondskribado povas esti interesa, kvankam ni nur kalkulu je 2 %-a respondo.

1.2. Interkonsentoj

- La reklamo atendu ankoraù ; ĝi komenciĝu nur en julio. Ni do ne jam decidis kiujn rimedojn uzi.
- Antaù ol fari reklamon, necesas pretigi la domstilon : HF laboras super ĝi, se eble ĝis aprilo. Post domstilo, antaù reklamo, ankoraù necesos plibonigi la kurson, do pretigi la ujon. Ni havu ofertojn por tio ĝis aprilo ; la kurso estu preta ĝis fino de junio '86.
- en GCA (kun HF) oni praktike pretigu ankaù la broŝuron. MV jes provos fari proponon pri la enhavo.
- Kvankam ni mem povos fari la laboron parte, profesia helpo estos interesa. Tia firmao havas desegniston, verkiston, PR-iston, ktp. kiel unu tutaĵo. Ĉe ni preskaù ĉiam estas izolulojn.

2. Manlibro FEL.

- MV transprenos la administradon : tajpado ĝis inkl. sendado.
- Ni provos plioftigi la aperadon de la folietoj.
- AC faris liston de interesaj temoj por la manlibro. Ĝi ne nur estu fonto de objektivaj informoj, sed ankaù enhavu konsilojn, ideojn, eblecojn, k.s. kiujn oni povos uzi aù ne, sekvi aù ne, laù propra elekto.
- Ni proponas la jenan financan aranĝon :
  - unua enskribo kostos 100 frankojn (koverto, titolpaĝoj, apartaj dokumentoj) + 1 franko po por la tiumomentaj paĝoj (1 folio = 2 paĝoj = 2 fr.)
  - postaj folioj : 1 fr. por ĉiu paĝo
  - ĉiam inkluzive de sendokostoj, laù belga enlanda tarifo



- oni pagu komencan sumon de ekz. 500 fr. Tiun ni metos en personan konton de la paginto. Ni subtrahos la sumon por la unua sendaĵo (100 + n x 1 fr). Ĉiun fojon poste kiam ni sendos pakaĵeton da folioj ni denove subtrahos la precizan sumon. Se restas malpli ol 100 fr en la persona konto, ni petos denove pagi sumon de 200 fr, ktp.
- kiu ĝis nun pagis la duan pakaĵon de 100 folioj (kiu ne jam aperis) ankaù estos enskribata en tiu sistemo, kun komenca saldo egala al la pagita sumo (+ 700 fr).

3. Instruistoj.

- Ekestis tute alia propono ol pasintfoja, pri la ekzameno por geinstruistoj.
- Ideo : ne nur utilas ekzameno por selekti bonajn instruistojn, sed pli utilas, eĉ necesas, formado de instruistoj. Ni do unuigu ambaù celojn.
- Ebleco (propono) : kvinsabata kadrokurso kun ĉiufoja ekzameneto ĉe la fino de la tago. Kiu sekvis la kadrokurson, kaj sukcesis en la ekzamenetoj, ricevu titolon "erkend door de V.E.B.". Nur por tiuj instruistoj oni faru reklamon en Panorama (por la aliaj jes mencio, sed ne subteno).
- La sama formado necesas por aliaj aktivuloj. Tial ni ellaboru la programon tiel ke ekz. 3-4 tagoj utilas al ambaù grupoj, + 1-2 tagoj por nur instruistoj, 1-2 tagoj por nur aliaj aktivuloj.
- Ni petos al PDS ellabori detalan programproponon. Kelkaj el la eroj : Esperanto-gramatiko (ekz. 3 x 2 h), movado (strukturoj, ...), didaktiko, ekzistantaj kurslibroj, vortaro, ...
- Por tiu kurso eblas uzi la manlibron de FEL kiel kurslibro. Alivorte : la kursotekstoj eniru la manlibron, en adaptita formo eventuale.

4. Ekspozicio.

- HF ellaboris taùgan ekspozicion. Ni do ne plu devos pritrakti tion. La stando estas 2 x 3 metrojn ; ĝi enhavos i.a.

(4)

tukon 3 x 1,5 metran (malantaŭa vando) kun granda teksto 'Esperanto, de internationale taal' kaj tablon kun tuko kiu montros la internacian 1987-simbolon. Ambaŭ tukoj, profesie ellaboritaj, estas aliloke uzeblaj.

- ID faris enkondukan tekston por la partoprenantoj de la naturborso. Ankaŭ tiu estas uzebla aliloke.

5. Diversaĵoj.

- stariĝis la demando kial ne unuigi la domstilon, nomon, revuon, emblemon ktp. por la tuta lando. Priparolinda ?
- venonta kunveno de la komisiono : 15.3.86, samtempe kun la ĝenerala FEL-kunveno.
- Antaŭ tio ni petos al PDS sendi siajn preparojn skribitajn al AC kaj MV, tiel ke ni la 15-an povos unuigi tiujn kun la hodiaŭaj rezultoj.



4. Instruontoj.

Laŭ la komisiono pli necesas trovi rimedon por mezuri la "sukceson" de kurso (pli ĝuste : la sukceson de kursgvidanto) ol rimedon por mezuri la teorian kaj lingvan konon de la instruisto. Proponoj estas jam ellaboritaj, sed ankoraŭ diskutataj de la komisiono.

Ĝenerala rimarko :

La komisiono povas iniciati kaj sugesti, sed al komisiono kvarpersona ne eblas aktive ellabori tian vastan taskaron. Oni do ĉiam pripensu : "Kiu efektive faros tion ?"

Petro De Smedt (la hodiaŭa raportanto) konsentis labori en la komisiono ĝis fine de 1985 kaj do, ĉesas sian kunlaboron hodiaŭ.

4. JUBILEA JARO (raportas André Staes)

A.S. anoncas ke antaŭ longe aperos en ESPERANTO ampleksa artikolo pri la evoluo de la Jubilea Jaro. Rilate al FEL, li opinias ke ĝi okupas elstaran lokon en la aro de landaj asocioj kiuj agadas por la jubilea jaro. Jen skize la programeroj en kiuj FEL estas reprezentata :

1. Kulturaj okazaĵoj : LVS Antverperno invitis la urbestron de Antwerpen prelegi pri la lingvaj problemoj en la mondo.
2. Konkursoj : konkurso por lernejanoj
3. Edukado : kadrokursoj kaj ekzamena komisiono
4. Informiloj - Informado : porjubilea informado helpe de profesia reklamagentejo.
5. Revuoj : traduko de jubilea numero de ESPERANTO
6. Eldonoj :
   - tekstoj de la kolokvoj, kadre de Klubo 100
   - Kia Miksaĵo : teatraĵo en la Nederlanda, Franca, Germana, Angla kaj Esperanto. La teatraĵo celas ne-esperantistan publikon.
   - Serioj : Esperanto, vi nur demandu (Piron) Nederlanda traduko
     Esperanto, ĉu Eŭropa, ĉu Azia lingvo (Piron) Nederl. trad.
     Esperanto, kion mi povas fari per tio ? (J. Bovendeerd)
     La Socipolitika, pedagogia kaj kultura valoro de Esperanto (E. Symoens) Nederlanda versio.

FEL nun okupiĝas pri la kunmeto de Patrona Komitato (ndr).

5. I.L.E.I

a) Dum la pasinta jaro, la plej grava atingaĵo estis la starto de oficiala Esperanto-kurso ĉe la Vrije Universiteit Brussel(VUB). Faras la kurson Emile Vandamme, el Schepdaal, senpage, sen iu ajn kompenso, eĉ ne por liaj transportkostoj.
Sekvas la kurson kvar ne-universitataj studentoj ! El tia situacio ni eklernas, ke ne sufiĉas starigi kurson, disponi pri la plej modernaj instruiloj kaj profesia instruisto.La grava problemo estas altiri studentojn ! Ni baldaŭ ekzamenos tiun problemon, kiam ni preparos la duan studjaron.Nu, la kurso ekzistas ; tio jam estas sukceso...

b) Mi ne multon faris pastinjare por nia enlanda sekcio, pro la fakto de mia vicprezidanteco de I.L.E.I.-internacia forrabis multan tempon : - preparo de la 20a Konferenco en Louvain-la-Neuve (12-19/07,
- intensa internacia korespondado por reorganizi diversflanke nian asocion ;
- redaktisteco de la Internacia Pedagogia Revuo, kies novstila kaj riĉenhava unua numero baldaŭ aperos ĉe G.C.A.
- inventarigo, kun G.Pirlot, de la tuta Esperanto-instruado en la mondo, je ĉiuj niveloj.

c) Mi finpretigis mian bibliografion pri universotataj tezoj kaj tradukis ĝin en la francan.Mi esperas ke ĝi aperos post kelkaj monatoj en speciala serio de la UEA-dokumentoj.

d) Mi ĉeestis kunsidon en Namur de la belga sekcio de I.L.E.I., dum kiu sinjoro Duchesne, funkciulo ĉe la Franclingva Ministerio pri Instruado, klarigis novan studmetodon por la franca, sed kiu estos adaptata al Esperanto.

6. INFORMADO

a) Ankaŭ la nuran enlandan informadon mi iom neglektis pro aliaj, pli ĝeneralaj taskoj.Mi tamen verkis kontribuaĵon por la lernejrevuo BLIKOPENER, kaj alian, sufiĉe longan, kiu aperos en DE VLAAMSE GIDS.
b) Estis kelkaj korespondaĵoj kun la ministro pri Instruado, kiujn mi nun reprenos surbaze de la Sofia rezolucio de UNESCO.Mi komencis la traktaĵojn por aperigi jubilean poŝtmarkon en 1987.La ŝtatsekretariino de PTT respondis ke la speciala komisiono ekzamenos mian demandon.Ŝi do ne rifuzis !
c) Mi jam multe korespondadis pri la AIMAV-kolokvo en 1987 ( verŝajne fine de septembro, en Gento). Temo : la neceso internacia de komuna interlingvo.
Ni klopodos intersi UNESCO ka precipe la plej altajn Eŭropajn Instancojn , same kiel ĉiujn asociojn de lingvo-instruistoj.
Mi jam estis en kontakto kun kelkaj altrangaj funciuloj de la Eŭropa Komisiono, kiuj unuavide tre pozitive reagas. Sed ĉio ĉi



ankaŭ forrabas multan tempon kaj demandas multan cerbumadon, sed el informorma vidmunkto, tiu kolokvo organizota de ne-esperantista organizaĵo, povos esti tre interesa por atingi personojn malfacile atingeblajn.

d) Sekce al la seminario en Aŭgsburgo, mi preparas la petitan MANLIBRO(n) PRI INFORMADO.

e) Estas multaj aliaj, okazaj kontaktoj pri Esperanto, ekz. por helpi studentojn kiuj verkas universitatan tezon pri Esperanto, por starigi spacialan sciancan komisionon pri interlingvistiko en la sino de la Internacia Asocio pri Aplika Lingvistiko (AILA), k.s.

Tre ofte , ni ne povas disigi la enlandan kaj la internacian agadon !

E.Symoens

maart 86

## GAZETARA SERVO

Karaj kunlaborantoj,

Antaŭ 3 jaroj ni provis imiti en Flandrio la tre sukcesplenan servon "Leteroj de legantoj"-Rebata + gazetara servo"- kiun Sro G. Pirlot kunordigas por franclingva Belgio. Multaj el vi eble sin demandis kiom sukcesplena la agado estis kaj ĉu unu aŭ alia propra letero de leganto efektive aperis. Ĉi-sube do listo de ĉiuj leteroj de legantoj kiuj dum 1985 aperis kaj kiujn oni konatigis al ni.

| | | |
|---|---|---|
| 1) Jacobs Ghilain | De Morgen | 29/10/85 |
| 2) Kempen J. | De Morgen | 05/09/85 |
| 3) M. Ponsaerts | De Standaard | 20/08/85 |
| 4) Roose F. | De Standaard | 10-11/8/85 |
| 5) Cooreman G. | De Standaard | 17-18/08/85 |
| 6) Symoens E. | De Standaard | 01/08/85 |
| 7) Hanssens J. | ZIE | 17/06/85 |
| 8) De Scheyper P. | ZEG | 15/03/85 |
| 9) Van Damme E. | Belang van Limburg | 26/02/85 |

9 leteroj de legantoj ne aperis aŭ estis direktitaj al radio aŭ TV.

PROPONOJ

1) Se eblas estu tiom ĝentila sendi al ni kopion de via letero al iu gazeto/revuo. Post iom da tempo oni tiucele akiros iun impreson de kia letero de leganto havas plej da ŝancoj esti publikigota.

2) Por ricevi superrigardon de gazetaraj publikigoj ni bezonas la artikolojn kiujn aperis pri Esperanto, lingvaj problemoj aŭ lingvopolitiko internacia.

3) ĈIAM necesas indiki la titolon, daton, adreson de la publikaĵo en kiu vi trovis artikolon. Dankon.

Listo de la personoj kiuj ricevas tiun ĉi informfaskon kaj kiuj reagis laŭ iliaj eblecoj :

1) Demonty, Marc, avenue des Missionnaires 39, b.5, 1080 Bruxelles
2) Peeters, Yvan, chemin de la Malaise 47, 6428 Ham-sur-Heure
3) Van Damme, Emile, Albert-I-straat 44, 1750 Schepdaal
4) Pirlot, Germain, Kemmelbergstraat 5, B.3, 8400 Oostende
5) Symoens, Edward, Putsesteenweg 131A, 2180 Heide
6) Van den Bosch, Eddy, Hoogstraat 32, 2768 Bazel
7) Vervecken, Theo, Steentjesblok 17, 2440 Geel
8) Jacobs, Ghilain, p/a Esperanto 2000, Duisburgsestraat 12, 3030 Leuven
9) Cooreman, Guido, Willekensmolenstraat 117, 3500 Hasselt
10) Hanssens, Jan, Meiweg 23, 8500 Kortrijk
11) De Schepper, P., Doornstraat 22, 2610 Antwerpen
12) Kempeneers, P., Leuvensestraat 43-45, 3300 Tienen
13) Bovendeerd, J., speeltuinlaan 14, 2510 Mortsel
14) Durwael, Y., Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem



15) Gerard, Anita, Antwerpsesteenweg 24, 2250 Broechem
16) Kusters, E.,Eikenlei 15, 2130 Brasschaat
17) Cordemans, Mieke, Schuttersvest 41/601, 2800 Mechelen
18) Schallenbergh, Edw., Jaak Lemmensstraat 4, 2970 Hever-Boortmeerbeek
19) Daem, Bob, Kruisveldstraat 9/2? 9550 Herzele
20) Rotsart, Roland, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge
21) Beckers, Rozenlaan 5, bus 1, 3950 Beringen
22) Claesen, Albert, Zonnebloemstraat 7, 3610 Diepenbeek
23) D'Hondt, Erik, Wilgstraat 25A, 9440 Erembodegem

In de mate van het mogelijke probeert ELKEEN om :

- te reageren op negatieve artikels of artikels waar het Esperanto mee in verband kan worden gebracht;

- deze artikels te verspreiden onder andere esperantisten en hen tot medewerking aan te sporen;

- artikels aan de persdienst te sturen met vermelding van datum, titel en adres.

- **Iedereen die bereid is om AKTIEF mee te werken is welkom** -

LIJST VAN DE PERSBERICHTEN VERZONDEN AAN EEN 20-TAL KRANTEN EN/OF TIJDSCHRIFTEN

| | |
|---|---|
| 1) Voor polyglotten, dec. 85 | verschenen ? |
| 2) Een andere manier om China te bezoeken, dec. 85 | verschenen |
| 3) Esperanto belangrijkste taal voor wetenschappen te San Marino, 11/85 | niet verschenen |
| 4) Anti-Tab (Vertaling uit het Esperanto) | zou nog moeten verschijnen |
| 5) Chinese wetenschappers voor Esperanto | verschenen ? |
| 6) Wie wil Esperanto leren ? Test 500 | verschenen |
| 7) Als Vlaamse marionnetten Esperanto spreken | verschenen ? |
| 8) Koöperatieven en jongerenarbeid (vertaling, aan het I.O.C.) | |

| | |
|---|---|
| APE | 272 artikels in 1984 |
| FEL IN 1984 | 3 artikels en 17 lezersbrieven |
| FEL IN 1985 | 47 artikels, 7 persberichten, 9 lezersbrieven<br>4 radio-uitzendingen, 1 TV-uitzending |

## MEDIA - OVERZICHT

A. LIJST VAN DE RADIO-UITZENDINGEN

1. Gewoonweg, 11/1/85
2. Esperanto-kursus (A. Staes), 2/9/85, B.R.T.
3. Kramiek, 27/10/85
4. Uit de Band, B.R.T., 28/11/85 (?)

B. LIJST VAN DE TELEVISIE-UITZENDINGEN

1. Steek-er-wat-van-op-show, B.R.T., 22/1/85

C. LIJST VAN DE VERSCHENEN ARTIKELS

1. Esperanto ?... Een andere manier om met het Chinese Rode Kruis kontakten te leggen", ingezonden voor het R.K. Jongerentijdschrift (moet nog verschijnen)
2. Naar Peking zonder tolk - Het Volk, 9/1/85
3. Esperanto, taal van de wereld - Het Volk, 13/12/85
4. Poolse 'Pop' in RMS Wilrijk - datum en krant onbekend
5. Esperanto in Werkgroep - VTB, 11/85
6. Jij en je feeststemming, Flair - 7/12/85
7. 19e Kongres van de Esperantisten - Vlaams Weekblad, 26/4/85
8. Esperanto-afdeling van start te St-Truiden - Belang van Limburg, 21/3/85
9. Pianist Geert Deboux universiteitsprofessor in Colombia - KBV, 24/1/85
10. Heel de wereld of niets, Knack - 17/4/85
11. Brusselse 'Metropole' blikt terug op zijn tijd van toen, De Standaard - 18-19/5/85
12. De Esperanto-beweging in Iran, Eenheid - juli/aug. 85
13. Wie wil Esperanto leren ?, De Trekker - januari 85
14. Belangstelling voor Esperanto, Brugsch Handelsblad - 15/2/85
15. Hoop op een betere wereld : Esperanto - Vlam, datum onbekend
16. Esperanto - Zeg, 15/3/85
17. Esperanto : pedagogisch verantwoord ? - Informtieblad Ministerie van Onderwijs, maart 85
18. Hun staking duurde een kwart eeuw - De Post, 10/3/85
19. Esperantobeweging graag geziene gast bij Raad van Europa - Het Laatste Nieuws, 23/1/85
20. Esperanto ? Waarom ? - Koerier, 23/1/85
21. Hoe weinig is nog in Brugge het Esperanto gekend en gewaardeerd - Brugsch Handelsbald, 1/2/85
22. Vriendschap over de grenzen heen - 't Periodiekske, 5/3/85



23. Esperanto als thematisch onderwerp - De Oostendse filatelist, 1/2/85
24. Esperanto doet leven - TV-Ekspres, 1-25/1/85
25. Wie wil Esperanto leren ? - Bond zonder naam, januari 85
26. Esperanto - De Morgen, 30/10/85
27. Een Vlaming als voorzitter van een 'culturele multinational' - Davidsfonds-mededelingen, 7/8/85
28. Esperanto-theater - Davidsfonds-mededelingen, nov/dec. 85
29. Een aanbevelenswaardige fonoplaat (G. Deboux) - theatertijdschrift 'De Scene', Antwerpen, datum onbekend
30. Esperanto - Publi-Joernaal-streekkrant, Halle, 2/1/86
31. Language and Faith - Eenheid, Juli/aug. 85
32. Esperanto - De Natuurvrienden, oktober 85
33. Die en Die naar Joegoslavië - Poppenspel, mei 85
34. Rijk door eenvoud - 't Periodiekske, 24/9/85
35. Esperanto in Tienen - Hier Tienen, 19/9/85 + Het Nieuwsblad, 20/9 + Publipers (26/9/85)
36. Agenda culturele raad Hasselt : Esperanto voor beginners
37. Waar de Esperanto-sterre bleef stille staan - Dagjes, februari 85
38. Esperanto - Infor Senior, juli/aug.85
39. Esperanto-Centrum Brussel - Deze Week in Brussel, 11/9/95
40. Esperanto voor visueel gehandikapten - De Standaard, 25/10/85
41. Eurocamp brengt jongeren uit negen landen samen in de Voerstreek - De Standaard, 10-11 augustus 85
42. Esperanto - De Standaard, 19/6/85
43. César Vanbiervliet : de grijze eminentie van het Esperanto - Het Volk, 12/4/85
44. Cyriel Buysse met pensioen - Gazet van Antwerpen, 28/2/85
45. Esperantisten hielden drielandenontmoeting - krant en datum onbekend
46. Esperantisten bliezen verzameling - Brugsch Handelsblad, 26/4/85
47. Uit de week van... - Flair, 4//6/85.

Herman en Annie DECEUNINCK-BOLLAERT
Villalaan 1, bus 4
1500 Halle
tel. 02/360.17.22

BELGA
ESPERANTO
FERVOJISTA
ASOCIO

BEFA



8. B.E.F.A. - JARRAPORTO 1985.

La Ĝenerala Jarkunveno de BEFA okazis en Bergen op Zoom (Nederlando), komuna aranĝo de BEFA kaj de FERN, niaj nederlandaj kolegoj.

Sabaton la 13an de aprilo, ekskurso al Neeltje Jans kun vizito de la Delta-plan-laboroj, festvespermanĝo dum kiu la urbestro salutis la partoprenantojn, kaj dancado.

Dimanĉon la 14an, antaŭtagmeze, apartaj ĝeneralaj jarkunvenoj de BEFA kaj de FERN. Posttagmeze, premenado en la urbo kun vizito de la E-o monumento.

La 37a IFEF-kongreso okazis en VEJLE (Danlando) de la 17a ĝis la 23a de majo. Pli ol 300 partoprenantoj el 19 landoj.

La BEFA-Prezidanto estis unuanime reelektita kiel ĉefkomitatano de IFEF kaj tiel partoprenis la IFEF-Estrarkunveno de VEJLE, komence de marto, kaj la IFEF-Estrarkunveno de BERGEN (Norvegio), komence de septembro.

BEFA-anoj ĉeestis:
- la IFES (Internacia Fervojista E-o Skisemajno) en MORZINE (Francio) 16-23.03.85;
- la 70a UEA-Kongreson de Aŭgsburgo;
- la tutsemajnan aranĝon de FFEA (niaj francaj kolegoj) en SAINT SAVINIEN okaze de ĝia ĝenerala jarkunveno, 23-30.09.85;
- la ĝeneralan jarkunvenon de GEFA (niaj germanaj kolegoj) en LICHTENFELS, 04-06.10.85.

BEFA kunlaboris en la tradukado de la UIC-leksikono, seslingva fervoja faka terminaro kun pli ol 12000 fakaj vortoj.

BEFA daŭrigis la du perkorespondajn kursojn de Esperanto kaj reenkondukis senpagan E-o buŝan kurson, 2 foje po monato, de novembro ĝis komence de junio kun meza partopreno de 15 lernantoj.
Ĉi-monate, BEFA rekomencos E-o konversacian kurson, 2 sabatoj po monato. Ankaŭ ne-fervojistoj estas bonvenaj.

BEFA aperigis 6 artikolojn en LE RAIL / HET SPOOR, sociala monata revuo poŝte sendita al ĉiuj fervojistoj deĵorantaj kaj emeritaj.

La venonta ĝenerala jarkunveno de BEFA okazos en Belgio, la 26an kaj la 27an de aprilo 86.

La 38a IFEF-Kongreso okazos en SKOPJE (Jugoslavio) de la 17a ĝis la 23a de majo 86.

Kompilis,
La Prezidanto,

L. DE SUTTER.



9. SEKRETARIA JARRAPORTO

Prikonsiderante la pasintan jaron kaj komparante ĝin kun la antaŭaj, mi ekhavis la impreson, ke iom post iom ni alvenas en ia flu-plirapidiĝo. Ŝajnas ke ĉio pli rapidiĝas, kvazaŭ ni alproksimiĝus al ia fest-aranĝo en kiu ĉio devas glite ka- glate funkcii. Oni sentas ian nervoziĝon kian oni spertus preparante ion gravan. Kaj fakte tiel ja estas.

Post malpli ol unu jaro, ni eniros la jubilean jaron de Esperanto kaj, ĉu tio estas grava ? Ĉu tio ne devas bone kaj glate funkcii ?

Nu, konante miajn konulojn, vin do, mi tiurilate ne malesperas.

Okazis jam kelkaj aferoj kiel preparo al la jubilea jaro. Ekzemple kolokvoj en kiuj ni esploris la situacion en niaj rangoj, enketis pri la sinteno de nia membraro, serĉis la kialon de ne-progreso en rilate kun la membronombro, pri kresko aŭ malkresko. Ni cerbumis, diskutis, recerbumis, rediskutis, petis la opinion de aliaj ktp. ktp. Kaj daŭre ni sentas ke io d e v a s malbone funkcii. Kiel klarigi, se ne, la fenomenon, kiel la daŭran ripeton de informpetoj, la daŭran funkciadon de niaj kursorondoj ? Kaj tamen ni ne vidas diferencon en la nombroj. Verŝajne jes en la personoj, sed pri tio vi en la lokaj grupoj certe havas pli klaran bildon ol ni en la centra estrar-kerno. Kaj ni esperas - kiel bonaj esperantistoj, cetere - ke finfine kaj se eble, nepre por la jubilea jaro, ni malkovros tiun inciteman, nervozigeman i o n , kio alportu al ni la solvon. Ĝi certe ie ekzistas. Ni sentas ĝian ĉeeston. Ni nur ankoraŭ ne malkovris ĝin.

Nu, dum ni plu serĉas, cerbumas, esploras, enketas ... ni eble, antaŭ ol daŭrigi, retrorigardu super la pasinta jaro kun la helpo de la ĉi sekvonta superrigardo. Mi klopodis fari ĝin kiel eble plej detale. Tamen, ĉiam eblas forgesoj. Do, se mankas io laŭ vi grava, bonvolu ne heziti rimarkigi tion al mi kaj dume pardoni al mi la forgeson aŭ preterpason.

1. OKAZINTAĴOJ

- 22 01 1985 : Televid-elsendo "Steek er wat van op show" en kiu ĉefrolis G. Maertens kaj K. Tytgat.
- 17 02 1985 : Semajno de Internacia Amikeco en Leuven, en kiu okazis kolokvo pri "Kiel gvidantoj povas plibonigi la simplajn rilatojn kun la membroj" (Transakcia analizo) sub la gvidado de Ivo Durwael.
- 15/16 03 1985 : Lingvoborso en Bruselo
- 16 03 1985 : Nia ĝenerala jarkunsido okaze de kiu ni instalis komplete restrukturitan estraron.
  Do, kiel vi scias, nun ekzistas nur minimum-membra kernestraro ĉirkaŭata de diversaj laborgrupoj kaj komisionoj.

Tiamaniere eblas, ne nur pli bone kaj pli koncentrate labori, sed ankaŭ ŝpari monon malpliigante la transport-kostojn.
Inter krampoj, mi dubas eĉ ĉu UEA ne sekvas nian ekzemplon, ĉar mi legis en la revuo ESPERANTO ke la UEA-estraro nun laboras sammaniere.

- 20 02 1985 : Markola kongreso en Bruĝo
- 29 04 1985 : 3-Landa Renkontiĝo en Wégimont
- 28 09 1985 : " " " Stollberg (GDR)
  En la tri lastaj okazaĵoj partoprenis delegacio de FEL.
- 05 10 1985 : ĝenerala kunsido pri - ĉefe - la nova kotizo-sistemo. Dum tiu sama ĝenerala kunsido okazis samtempe - aŭ pli bone, tiu ĉi ĝenerala kunsido okazis en la semajno, en kiu okazis ekspozicio en Grand Bazar, Antverpeno.
- 27 10 1985 : Radio-elsendo "Kramiek" en kiu estis intervjuata Ite Tygat.
- 23 11 1985 : ĝenerala jarkunsido de BEF en kiu ni kompreneble ankaŭ partoprenis.
- 28 11 1985 : Radio-intervjuo de Emiel Van Damme en la programo "Uit de band".

Plie okazis enketo rilate al la sinteno de la Esperanto-lernintoj kaj membroj de FEL.

2. ELDONOJ :

2.1. - Claude Piron : Esperanto, een Europese of een Aziatische Taal.
- Edward Symoens : De sociopolitieke, pedagogische en kulturele waarde van het Esperanto.
- Helmar Frank : De propedeutische waarde van de Internationale Taal Esperanto.
- Claude Prion : Esperanto ? Je vraagt maar.
- Guido Thys : Flandra kaj Nederlanda Esperanto-bibliografio
- J. Bovendeerd : Esperanto, kion mi povas fari per tio?
  Esperanto, wat kan ik däärmee doen ?

2.2. LITERATURO
- Deck Dorval : Jaĥto veturas for ...
- Felix Timmermans : Kristnaska Triptiko
- Rik de Roover : La aventuroj de ŝpar- kaj alia porkoj.

2.3. ALIAJ
- Erik D'Hondt kaj Petro De Smedt : Esperanto en Belgio
- Paul Peeraerts : Manlibro de la Aktivulo.



2.4. KURSOJ
- Esperanto Prgramita
- Koresponda Kurso
- Kadrokursoj (tekstoj ankoraŭ haveblaj)

2.5. KOLOKVOJ : tekstoj ankoraŭ haveblaj.

2.6. DIVERSAĴOJ
- la tekstoj de la diversaj kolokvoj
- LIBROVERMETO (Erik D'Hondt)
- en preparo : Centra Katalogo pri -Esperanto-verkoj en Flandraj Bibliotekoj (Guido Van Damme)
- Librolisto de la libroj en nia stoko. Ĉi listo estas kompletigota en la tempo.

3. KADROKURSOJ
Andre Staes prelegis pri niaj kadrokursoj okaze de la Universala Kongreso en Augsburg. Li tie vendis kvanton de niaj kursotekstoj. El tio sekvis interesiĝo de diversaj landoj.
Alia sekvo, kaj tio estas pli grava, en la komsiono pri Instruado de UEA, en kiu partoprenis Edward Symoens, oni petis de FEL prepari bazan labor-dokumenton cele al internaciigo de la kadrokursoj. La unuaj paŝoj tiudirekten jam estas metitaj. Ni atendas nun la sekvon, verŝajne post la Pekinga UK.

4. TEST 5000 : havis kiel sekvon pli ol 850 reagojn.

5. PROPAGANDO-EKSPOZICIOJ
FEL akiris novan, modernan ekspozici-materialon facile munt- kaj transporteblan.

6. TURISMO : Al la pasiŝtaraj proponoj aldoniĝis unu plia pri kampadado iniciatita de P.J. van Duijne.

7. ĜENERALAĴOJ
7.1. Universitataj studoj :
Prof. Herman De Leeck, profesoro pri sociologio en UIA, akceptas ke studentoj faras studon pri Esperanto por sia finjara tezo.
7.2. Erik D'Hondt kunmetis saketojn da eksterlandaj poŝtmarkoj por ekspo-zocioj, librobudoj k.s.
7.3. Plifruigo de la apero de ESPERANTO PANORAMA : por ke la novaĵoj atingu la grupojn kaj membrojn ĝustatempe, decidiĝis aperigi la bultenon en la mezo de la paraj monatoj.

Konkludante, ni do ne rajtas plendi pri nesufiĉa agado. Cetere, se la ĉi supra superrigardo koncernas ĉefe la atingojn kiujn ni ĉiuj kune realigis pere de la Centro, sur loka nivelo bona agado certe ne mankis. Supraĵa rigardo

al la tabelo pri grupa agado jam sufiĉas por ekhavi klaran bildon.

Konsidere al tio, ni - t.e. la estraro - kuraĝas esperplene alfronti la estonton, kalkulante je via ĉies kunlaboro. En la pasinto vi ĉiuj certigis nin pri via fido, lojale kunlaborante kun ni en diversaj entreprenoj. Ni pensu jam nur pri ekzemple la kunmeto de la katalogo pri Esperanto-verkoj en Flandraj bibliotekoj. Aŭ pri nia manovro por atingi pli altan nombron da lokaj grupoj, kiam temis pri la akiro de oficiala oficisto. Kiam ni proponis centraligi la administradon, vi sekvis nin, eĉ se eble tiu entrepreno elmontriĝus ne tiel sukcesa, kiel ni opiniis aŭ esperis.

Mi ne certas, sed ŝajnas al mi, ke tie ni iasence eraris, almenaŭ en rilato kun la enkasigo de la kotizoj. Ni povus al ni demandi ĉu ni ne ofendis aŭ malkuraĝigis la grupajn kasistojn, forprenante de ili la taskon pri memorigo de kotiz-renovigo. Ĉu erare ? Mi esperas. Tamen, la granda membroperdo datiĝas de tiam.

Sed ni estu singardaj. Ni ne tro rapide ĵetu ŝtonojn. Same bone eblas, ke certa nombro de tiamaj membroj forfalis, ĉu pro tio ke ili aliĝis nur por plaĉi al iu loka persono (kasisto, estrarano k.s.), ĉu ĉar ili profitis la okazon por ne plu renovigi sian kotizon ekde la ĉeso de kasista premo. Kiu diros la veron ? Fakto estas, ke ni troviĝas antaŭ la ... faktoj. Bedaŭri ni povus, sed ne devas, ĉar tio estas ne pli ol nura tempoperdo. Ni pensu antaŭen, dum ni retenu de la psinteco vian afablan, amikan, energian, fidelan, lojalan kunlaboron. Tio estas la bazo de nia tuta entrepreno kaj vere, retrorigardante al tiu sinteno en la lumo de niaj komunaj atingoj, mi povas diri por mi mem : "Mi fieras, ke mi povas labori por vi kaj kun vi."

Sed restas la estonto. Atendas la Jubilea Jaro. Multo jam fariĝis kaj certe ankoraŭ fariĝos. Sed ĉu eble ni povos fari ion specialan. Nur por ni kaj inter ni ? Ekzemple, kaj tio estas fakte defio, meti cel-membro-nombron, ni diru 1.000, por tiel eniri la jubilean jaron ? Ĉu tio ne eblus ? Normale jes. Ni trovu la vojon, ĉiuj kune. Ĉiu laŭ sia eblo kaj kapablo.
Kiu scias, eble nia nova kotizo-sistemo povos helpi ? Ni eble ankaŭ rekonsideru la iaman kategorion de "Amikoj de Esperanto", la vendon de amikaraj kartoj do, aŭ io simila. Vi nur bonvolu kompreni - ah vi jam komprenas ! - ke fakte tiu tasko apartenas al la taskaro de la lokaj aktivuloj kaj grupoj.

Ĉiukaze mi volus alvoki la kursgvidantojn, ke ili komprenigu al la lernantoj, ke se ili ŝatas ricevi informojn kaj legaĵojn aŭ profiti niajn servojn k.s., tio eblas nur kondiĉe ke estu sufiĉe da personoj kiuj subtenas tion. Da membroj, do.

Kiel mi jam diris, pri la loka agado ni ne timas. Ni scias ke vi estas pretaj kunfari. Ni nur ne volus, ke vi ĉiam agadu nur por esti unu foje jare gratul-



ata kaj aplaŭdata. Ni volus fari pli. Ni volus iomete kuraĝigi vin kaj tial la estraro proponas organizi ian konkurson kun rekompensa premio por tiu grupo, kiu sukcesos kreskigi sian membrokvanton per la plej alta re-aliĝ-nombro. Kaj por ke la kampanjo - ĉar finfine temas ja pri kampanjo - ne estu nur unufoja okazaĵo, mi volus proponi al la estraro kiun vi elektos poste, daŭrigi la konkurson kaj premiumadon en la venontaj jaroj. Ni povos pli detale priparoli tion en nia posta debato pri estonta agado.

Eble mi povus tuŝi vorteton pri certaj spertoj kiuj trafis min en la lastaj monatoj kaj kiuj ŝajnas al mi bona preparo al tia konkurso.
Ekzemple la Antverpena LA VERDA STELO enkondukis certajn ŝanĝojn en sia kluba programado. Tro fruas por scii jam ĉu tio bone influos la grupan vivon, do ankaŭ la membro-re-aliĝon, sed laŭ la unuaj reagoj kiuj atingis min, la Verdstelanoj jes estas kontentaj.
Per tio mi volas fakte diri, ke se ŝanĝoj ne ĉiam estas danke akceptataj, ili tamen povas esti necesaj. Cetere, ne nur LA VERDA STELO bone laboras. Tion ja elmontras la tabelo pri grupa aktiveco kaj la raportoj kiujn vi povas legi en ĉi numero de INFORMILO.

Dume, mi ne povas, ne rajtas forgesi mencii la grandegan laboron faratan en Kortrijk. Laboro pri kiu ni nur malofte ion aŭdas, sed kiu senĉese pludaŭras kaj kiu devigas nin al profunda admiro. Temas pri la Fondaĵo Vanbiervliet.

Jen, tiom da kuraĝigaj faktoj, kiuj certe helpos nin atingi la finan venkon, de ĉiu inter ni esperata. Jen, karaj geamikoj, nenia kialo por malesperi. Nenia kaŭzo por malkuraĝigo. Ni tute simple daŭrigu, firme, seninterrompe, kuraĝe, kun eble jena - laŭ mia scio Ĉina - slogano antaŭ la okuloj :

" La plej alta en la homa vivo estas neniam kontenti pri si mem, sed daŭre klopodi fari pli bone kaj grimpi pli alten."

Dankon pro via ekzempla atento.

JB.

--------------------

10. Antaŭ ol anonci la paŭzon, la prezidanto atentigas pri :
10.1. La forpaso je 18 02 1985 de nia honora komitatano F. COUWENBERG, kiu esperantiistiĝis en 1936, estis sekretario de LA NORDA STELO, kiun li restarigis post la dua Mondmilito kaj estis prezidanto de la grupo ekde 1946. F. Couwenberg estis eminenta esperantisto kaj dum pluraj jaroj aktive kaj fruktodone laboris por la Esperanto-movado.
10.2. la jubileo pri 60-jara ekzisto de la Kortrijka LA KONKORDO, kiu : fondiĝis en 1925, ĉefe de G. Debrouwere, Cesar Vanbiervliet kaj F. Van Dommele. 1-a kurso en 1928, kluba bulteno en 1930, E°-kurso en la radio en 1934. 1940 : fino pro la milito. 1949 : renaskiĝo. 1970 : reapero de

Cesar Vanbierbliet kiu sukcesis starigi Esperanto-sekcion en la publika biblioteko, la faman fondaĵon Vanbiervliet. 1974 : aliĝo de Jan Hanssens kiel sekretario. J. Hanssens multe aktivis en la loka gazetaro kaj tre intence laboris kaj laboras kun Cesar Vanbiervliet. 1980 : publikigo de Katalogo pri la pretigitaj revuoj en la biblioteko. 1984 : komplemento al tiu katalogo.

Post tiu mallonga skizo de la Kortrijka grupo, la prezidanto prezentas donacon pri kiu li fakte ankoraŭ ne diponis. Li promesas tamen ke la tut-unua eldono de nia ĵus-akirita eldonejo STAFETO, nome "Ĝu rakonti novele" de Johan Valano, iros al Kortrijk kiel jubilea donaco.

Fino de la unua parto kaj paŭzo : 16.00 h.

----------

Rekomenciĝo : 14.15 h.

Prezidas : Paŭl Peeraerts.

1. Eksiĝo de la estraro.
2. Propono de la administrantoj :

Antwerpen : Gerd Jacques
Ray Gerard
Ivo Durwael

Mortsel : Paula Tytgat-Deketelaere
Wilrijk : Linda De Schepper
Kalmthout : Edward Symoens
Hasselt : Marcel Aerts
ALbert Claesen
Bruselo : Jef Staels
Leuven, Esperanto 2000 : Luc Rijnders
Marc Vanden Bempt
Aalst : Erik D'Hondt
St. Niklaas : Leo Corijnen
Gent : Arpas Lödör
Mechelen : Ward Schallenbergs
Kortrijk : Cesar Vanbiervliet
Brugge : Paco kaj Justeco : Georgette Wybouw
Knokke : A. Marmenout
La direktoro de GCA : Paul Peeraerts, kiu tamen estas oficisto, do ne.
La redaktoro de E-o PANORAMA : " " " " " " "
la ĉefdelegito de UEA : Andrée Orsolini
La komitatanoj de UEA :Albertine Dreze kaj E. Symoens (kiu jam estas)
La reprezentanto de FLEJA : Jean Pierre VandenDAELE



Kooptitaj administrantoj

Roland Rotsaert
Hilde Vaningelgem-Vandriessche
Jos Vandeberg
Kiki Tytgat
Katja Lödör
Roger De Schepper
Jan Bovendeerd.

3. ESTRARO

Roland Rotsaert
Ivo Durwael
Edward Symoens
Erik D'Hondt
Hilde Vaningelgem
Jan Bovendeerd

4. Prezidanto : Ivo Durwael.

JB retransprenas la prezidon nome de Ivo Durwael.

5. Estonta agado :

5.1. Konkurso

Porponate estas konkurso por la grupoj, cele al atingo de 1000 membroj por la jubilea jaro.
Kiel premio proponiĝas po BF 100,- por ĉiu plia membro por tiu grupo kiu atingos la plaj altan pligrandigon de la membro-nombro.

Por helpi kaj instigi, la estraro regule publikigos en INFORMILO la staton de la membraro laŭgrupo kun komparo al la antaŭa jaro.

5.2. Manlibro de la Aktivulo

Transprenos la administradon Marc Vanden Bempt. Li promesas pli malmultekostan kompletigon de la ekzistanta manlibro.

5.3. Mondeponoj

1. VERDA KONTO : estas ŝparkonto, kiu alportos 6 %-an rentumon. Temas pri fiksaj mondeponoj.
2. KURANTA KONTO : ĉiu povas malfermi kurantan konton kaj pere de tiu profiti de la FEL-servoj rilate al ekz. pago de kotizoj, abonoj, libroj, kongresoj k.s. esperantaĵoj.
Pliaj detaloj bonvole petu de la Esperanto-Centro.

Fino de la kunsido : 17.15 h.